
Revuo de La Kanada Esperanto-Asocio | somero-aŭtuno 2015

# Lumo

ISSN: 0827-3154

La lasta kaj plej bunta numero de la nuna redaktoro...



Panoramo de la ĉirkaŭaĵo de William Peace universitato, kie okazis (kaj okazos ĉi-jare) NASK.

## Enhavo : skizo


Kanadaj aferoj 5

Ĝeneralaj artikoloj 27

Diversaĵoj 32


*La foton (maldesktre) faris Don McIntosh. Vidu lian artikolon,* *p.17.*

**Limdato por la venonta numero: 15a de aprilo 2016**
**lumo@esperanto.ca**

## Detala enhavo de la numero


| | |
|---|---|
| Kolumno de la redaktoro | 3 |
| Novaĵoj pri Kanado | 5 |
| La estraro de KEA ekagadas | 6 |
| La Viktoria Esperanto-klubo festas | 8 |
| Nekrologo de Kim Keeble | 10 |
| Malapero de Esperanto-klubo en Vankuvero | 11 |
| Raportoj: | |
| pri la komuna kongreso en Detrojto | 12 |
| pri NOREK 2015 | 16 |
| pri NASK 2015 | 17 |
| pri vojaĝo en somero 2015 | 19 |
| Anonco pri MeKaRo 2016 | 24 |
| Anonco pri NOREK 2016 | 25 |
| Anonco pri stipendioj de KEA | 27 |
| Raporto pri filmfarada seminario | 28 |
| Rex Murphy, 'Rememortago' | 30 |
| Diversaĵoj | 33 |


## Anoncoj

**Se vi deziras skribi papere al la (nova) redaktoro (vidu p.2), bv. uzi la jenan adreson:**


**Lumo**

**1502-340 Dixon Road**

**Etobicoke ON M9R 1T1**


***Lumo*** **estas la revuo de La Kanada Esperanto-Asocio. Ĝi aperas 2-foje jare kaj estas senpaga por la membroj de KEA. Por membriĝi en KEA, vizitu nian retejon,**

**http://www.esperanto.ca/eo**

**Limdato por la venonta numero: 15a de aprilo 2015**

**Sendu kontribuaĵojn al:**

**lumo@esperanto.ca**

# Kolumno de la redaktoro



Jen mia lasta numero kiel redaktoro de ĉi tiu revuo... almenaŭ por la momento—ĉar, trarigardante antaŭajn numerojn, mi konstatas ke mi redaktis ĝin de 2000 al 2005 kaj denove de 2012 al nun, do efektive ĝis fino de 2015. En 2005 certe ne estis mia intenco reveni al la tasko. Sufiĉe longa periodo entute, ŝajnas al mi, preskaŭ ĉiam, cetere, kun la helpo de Steĉjo Norvell. Vi vidos supre foton de via redaktoro farita en Verono en 2009, kie li aspektas iom freneze: nu, kiel dirus Obelikso, 'Ili estas frenezaj, tiuj romianoj!' Menciiĝu, ke mi intencis jam montri tiun foton en antaŭa numero, sed rezignis, ĉar Steĉjo iom malaprobis la malseriozecon. Mi esperas, ke li pardonos mian nunan spritemon malgraŭe.


# Kolumno de la redaktoro

Kiel legantoj rimarkos, mi strebas finfine ĝin iom modernigi, kun la helpo de Ĵenja Amis, kiu pretigis la ŝablonon por ĉi tiu numero, ankaŭ kun tiu de la nova redaktorino, Kamila Koziej-Lévesque, kies retadreson vi trovos kovrile. Ili certe ne respondecos pri la fuŝoj, kiuj sendube restos. Mi certas, ke sub ĝia nova redaktoro nia revuo floros; ĝi cetere devos aperi pli ofte, tri aŭ kvar fojojn jare. Bv. daŭre al ŝi sendi viajn kontribuaĵojn, raportojn, distraĵojn. La nova dissendo-maniero ŝajne ne malplaĉas : oni apenaŭ ricevis plendojn pri ĉi tiu elektronika formato. Iuj evidente ricevos ĝin papere, kiuj ne havas retaliron. Mi danku ankaŭ Bob Williamson kaj Mateon Chisholm pro zorga kaj utila preskontrolado; Ĵenja Amis afable provizis min per ŝablono por ĉi tiu numero (preparita pere de Publisher).

Jen ĉio. Mi deziras al vi agrablan legadon. Mi ne povis ĉion enmeti, kio min atingis, pro kio mi pardonpetas (ekz. al Wally du Temple kaj Lottie Ericson). Sed mi transdonos restantajn materialojn al mia posteulino.

# NOVAĴOJ PRI KANADO

## Nova grupo



La unua kunveno de la Esperanto-grupo en Hamiltono, Ontario

Tiffany Antopolski, Trevor Brown, Janusz Sulżycki kaj Michael Mallon

## Kanada Antologio

Estimataj Kanadaj gesamideanoj

Jen (sube) laborloko por plibonigi malnetaĵojn por la Kanada Antologio.

Se vi deziras helpi, bonvolu legi la tekstojn kaj sendi al

wallydutemple@telus.net

eventualajn proponojn por plibonigo.

http://wallydutemple.com/wp/wp-admin/edit.php

# LA ESTRARO DE KEA EKAGADAS

La estraron de KEA nun konsistigas la jenaj personoj:

Paul Hopkins (prezidanto), Mateo Chisholm (sekretario), Raymond Brisebois (kasisto), Tamara Koziej-Lévesque, Ĵenja Amis, Andrew Sly, Bob Williamson kaj Geoffrey Greatrex (vicprezidanto).

En la venontaj numeroj de *Lumo* sendube sin prezentos, iom post iom, la estraranoj; iujn legantoj jam konos. Necesas substreki la grandan ŝuldon, kiun devas KEA al la ĵus eksiĝinta sekretario Ken Price, kiu multjare forte laboris por nia asocio. Mateo Chisholm, pri kies agado oni jam povis legi en la lasta numero, jam ekagas en sia nova rolo: vidu la sekvan paĝon. La estraro strebas renkontiĝi pli-malpli ĉiumonate per Skype kunsido.

# LA ESTRARO DE KEA EKAGADAS

KEA deziras daŭre subteni la partoprenon de kanadanoj en internaciaj aranĝoj: vidu la anoncon, p.27, pri stipendioj.

Oni ankaŭ laboras por pretigi antologion de kanada literaturo: vidu la anoncon, p.5.

Jed Meltzer ĵus elektiĝis kiel kunordiganto de junulaj aferoj por KEA. Se vi estas junulo en Kanado, kaj deziras informiĝi pri junulara agado, bonvolu kontakti lin ĉe jedmeltzer@gmail.com .

## Novaĵoj pri KEA

KEA nun kreis PayPal-konton, por ke tiamaniere oni povu aliĝi kaj donaci al la asocio.

Oni renovigis la Facebook-paĝon de kanada komunumo de Esperantistoj en Kanado ('Esperanto en Kanado'). Vidu p.38 por pli da detaloj pri Facebook kaj Esperanto en Kanado.

# VIKTORIA ESPERANTO-KLUBO FESTAS

Ralph Gonyea kun sia edzino Val



Je la 12a de decembro la membraro kunvenis en la ĉarma ligna domo de Wally kaj Olga du Temple. Ni havis tri kialojn kunesti. Unue, ni festis Zamenhof-tagon (jes, tri tagojn antaŭ la vera tago). Due, ni ankaŭ festis la naskiĝtagon de Ralph Gonyea, longtempa Esperantisto kaj klubmembro, kiu bonŝance naskiĝis je la 15a de decembro, simile al Zamenhof.

Sed nun la tria kialo meritis ĉampanon!!! Ni havis alian okazon gratuli Ralph!!!

Wally du Temple malfermas ĉampanbotelon



Li edziĝis antaŭnelonge kaj li venis kun sia agrabla edzino, Val, kiu transloĝiĝis ĉi tien antaŭ kelkaj jaroj de Ontario. Ĉi tio inspiris al Wally malfermi ĉampanbotelon, kio okazis kun bruo kaj ŝaŭmo, kaj ni dronigis ilin per feliĉa ridado kaj oceano da bondeziroj.



**La paro, Val kaj Ralph, Susan Ellis, Lottie Ericson, Erik Pedersen, Ethel Sabbath, Olga du Temple, Richard Menegozzo**

# Nekrologo de Kim Keeble

En oktobro 2015 mortis en sia lito Dorothy E. 'Kim' Keeble (1925.06.10 - 2015.10.27), honora membro de KEA.



Dum multaj jaroj, Kim partoprenis esperantistajn agadojn en Nov-Skotio kaj, antaŭ 30 jaroj, en Brita Kolumbio. Ŝi ĉeestis Universalajn Kongresojn en Vankuvero (1984) kaj Havano (1990). Ŝi korespondadis kun samideanoj ĉirkaŭ la mondo, kaj restis UEA-delegito por Dartmouth (Nov-Skotio). Ŝi konis multajn esperantistojn tra Kanado kaj Usono. En 2001, la Kanada Esperanto-Asocio (KEA) nomis ŝin Honora Membro. Daŭra membro de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), ŝi ĉefe interesiĝis pri la instruado de Esperanto. Multajn eklernantojn ŝi zorge gvidis ĝis sukceso tra la malnova perpoŝta kurso. Dum jaroj ŝi volontulis en lokaj lernejoj por instrui gestudantojn pri Esperanto, kaj ŝi multe fieris pri la sukcesintoj. Ĝis la morto, ŝi instruis infanojn de geamikoj pri nia lingvo. Ni ĉiuj multe sentos la mankon de ŝi.

*Noto de la redaktoro: oni elektis Kim al la 'panteono' de edukado.net pro ŝia nelacigebla instrua agado. Mi ĉiam konservos belajn memorojn de Kim, kiun mi konis dum mi loĝis en Nov-Skotio je la komenco de la jarcento.*

# Malapero de Esperanto-klubo en Vankuvero

## Bruce Arthur

Vankuvero estas la plej granda kanada urbo sen Esperanto-rondo. Estis rondo tie, sed ĝi malaperis. Kial?

Per korespondado kun Wally du Temple de North Saanich (Brita Kolumbio), mi lernis ke estis vankuvera Esperanto-societo. La societo havis almenaŭ kelkajn membrojn, el kiuj la plej aktiva estis Brian Kaneen. Mi trovis artikolon pri la vivo de Brian Kaneen (verkitan de Mark Fettes) kaj tiu artikolo donis pliajn informojn. (*NdlR : Mark aperigis nekrologon en* Lumo *2012/1*, 26-7).

Brian Kaneen loĝis Vankuveron ekde 1965 kaj aktivis en la vankuvera Esperanto-societo dum la sekvaj jardekoj, kiel la sekretario kaj poste kiel la prezidanto. Li organizis kaj gvidis multajn Esperanto-kursojn. En 1984 Vankuvero gastigis la UK-on kaj Brian Kaneen helpis pri tio. (Ĝis nun, Vankuvero estas la ununura kanada urbo kiu gastigis UK-on). En sekvaj jaroj, la vankuvera Esperanto-societo plu funkciis—membroj kunsidis por konversacii per Esperanto. La societo ankaŭ havis tre bonan retpaĝaron informriĉan.

Tamen en 2012 Brian Kaneen mortis. Kvankam aliaj membroj restis, la klubo ĉesis funkcii. Ankaŭ la retpaĝaro malaperis.

Mi esperis ricevi la pensojn de eksmembroj de la vankuvera Esperanto-societo. Tial mi skribis leterojn al la tri vankuveranoj en la membrolisto de KEA de 2014. Sed neniu respondis. Supozeble ili ne havis tempon aŭ eble intereson. Verŝajne pro la sama kialo ili ne daŭrigis la societon.

Entuziasmuloj lastatempe starigis Esperanto-rondojn en Saguenay, Hamilton, kaj Kitchener. Espereble iam iuj faros simile en Vankuvero.

# Raporto pri la komuna kongreso en Detrojto

Mi estas Steven Horvath kaj KEA min petis verki artikolon pri miaj spertoj je la dulanda kongreso, kiu okazis en Detrojto, Miĉigano. Mi ŝatus danki al KEA pro ĝia helpo por permesi al mi partopreni la kongreson.

La kongreso okazis ĉe la universitato Wayne State. Kvankam la universitato ne estis marŝe atingebla de la urbocentro, ĝi konvene estis lokita malfore de la internacia instituto kie la plimulto de la eventoj okazis, kaj oportune por la loĝejo, Esperantistoj uzis unu el la dormejoj, kie ni havis komfortajn litojn kaj individuajn necesejojn.

Mia alveno je vendredo posttagmeze donis al mi la eblecon viziti la instituton por saluti la Estraron, kiu kunvenis tie. Poste, ni havis socian vesperon en la dormejo, kie mi renkontis novajn personojn kaj vidis familiarajn vizaĝojn.

La kongreso en Detrojto ekis je sabato kiam Orlando Raola malfermis la kongreson kaj ĉiuj Esperantaj kluboj donis siajn salutojn. Inter la kanadaj kluboj estis la Kalgaria Esperanto-Societo, Esperanto-Londono, kaj la Esperanto-Societo Kebekia, kaj KEA.

La plej grava temo por kanadanoj estis ke la Universala Kongreso de Esperanto ne okazos en Montrealo en 2017. Sed KEA sendis la peton al Esperanto-USA, kiu konsentas doni sian subtenon por ke Montrealo rekandidatiĝu por la UK en

2019. La estraro proponis ke la venonta kongreso okazu en Miami, kaj NASK okazu samtempe por permesi al pli da homoj partopreni; ankaŭ ke la kongreso post Miami okazu en la okcidenta flanko de la lando.



**Steven Horvath, Sinĝeno Karpp, Tamara Koziej**

Sinjoro Raola indikadis, ke li esperas ke la estrari de Esperanto-USA malkreskos al 3 personoj. Post la solena malfermo, iuj kongresanoj vizitis la muzeon de historio, kiu estis trovebla en la sama strato kiel la internacia instituto.

La muzeo estis tre interesa, en kiu montriĝis la historio de Detrojto.

Post la tagmanĝo, KEA aferkonsidis. Oni diskutis pri la fakto ke Montrealo deklaris sian intencon gastigi la Universalan Kongreson en 2019. Joel Amis daŭros kiel administranto de KEA. Ankaŭ la estraro de KEA deklaris ke stipendiojn oni donis al Kamila Koziej-Lévesque kaj mi (Steven Horvath) por partopreni kongresojn. Kamila partonprenis la UK-n en Lillo kaj NASK, kaj mi partonprenis la dulandan kongreson; Constance Koziej ankaŭ ricevis stipendion por ĉeesti NASK kaj la komunan kongreson. Ni parolis pri la fakto ke nia retejo ne bone funkcias. Ni ankaŭ deklaris ke ni havas la plej grandan esperantan bibliotekon en Nord Ameriko. Ni diskutis kiel funkcios nia biblioteko, kaj ni trovis ke eble ĝi devos funkcii

alimaniere, ĉar niaj membroj estas dissemitaj tra la dua plej granda lando en la mondo.



Dum sabata posttagmezo ni rondiris la aŭtofabrikon Ford Piquette, kie Ford konstruis la unuajn Model T. Ĝi certe estis interesa por vidi kiel Detrojto famiĝis kaj kiel la aŭtoindustrio ekis.

Post vespermanĝo ni revenis al la internacia instituto por spekti sendependan filmon tradukitan en Esperanton de unu el niaj esperantistoj. Danny Johnson Saves the World estas nigra kaj blanka filmo kreita en 2015, kiu montras kiel juna knabo nomita Danny Johnson savas la mondon de malbonaj ekstermonduloj. Poste, ni aŭdis kelkajn originalajn amerikajn historiojn.

Dimanĉan matenon, post matenmanĝo, unu el la membroj de Esperanto-USA prelegis pri paco en la Sankta Lando. Post tio, Tamara Ne Amara min demandis, ĉu mi ŝatus modeliĝi por ŝi. Mi ne sciis kion tio postulus, sed mi tamen konsentis. Ni ĉirkaŭmarŝis la apudan kvartalon, kie ŝi min petis pozi por bildoj, kie mi manĝas

florojn. Finfine, Tamara volis fari bildojn de KEA membro por uzi en sia prelego, kiun ŝi faros la venontan tagon.

Posttagmeze, grupo da partoprenantoj vizitis la Heidelberg-Projekton. La Heidelberg-Projekto estas strato en Detrojto, kiu nomiĝas Heidelberg. La projekto kreiĝis en 1986 kiam Detrojto spertis grandskalan senlaborecon kaj multe da domoj en Heidelberg street forlasiĝis. Artisto nomata Tyree Guyton transformis la domojn en arton. Multe de la gazonaroj enhavas aĵojn, kiujn personoj normale konsiderus fatraso, kiun li aranĝis kiel arton modernan.



# Raporto pri NOREK 2015

## Wally du Temple

NOREK, la Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Konferenco okazis en Viktorio, Brita Kolumbio inter la 25-a kaj la 27-a de septembro 2015. Dudek ok geesperantistoj partoprenis en ĉi tiu renkontiĝo kiu okazis ekde la jaro 1981. La eventon kutime organizas esperantistoj de la ŝtato Vaŝingtono kaj provinco Brita Kolumbio en alternaj jaroj.



La unua programita evento estis la distra vespero. La ĉefaj kontribuantoj estis Maria Hopkins kaj Arlyn Kerr. Maria aktore deklamis fabelojn kaj Arlyn gvidis ludojn. Ĉio okazis en intime malgranda salono.

Sabate matene Wally du Temple malfermis la unuan sesion de NOREK per prelego kun la titolo, 'Muroj de Miljaroj'. Poste Eric Petersen parolis pri la projekto de 'Kanada Antologio' kaj legis verkojn, kiujn li jam tradukis tiucele. Sekvis tiu eminenta prezento de Paul Hopkins, Prezidanto de KEA, pri la ĉi-jara Komuna Kongreso en Detrojto kaj pri la agado de KEA.

Nekutima afero, la bankedo ne okazis vespere sed tagmeze. Bunta kaj varia elekto de bongustaĵoj por ĉies gusto kaj dietaj preferoj estis proponitaj sur longa servotablo.

Post la bankedo Paul Hopkins anoncis ke KEA voĉdonis por alelekti Olga du Temple kiel 'honora membro' de KEA pro ŝia longtempa laboro kaj por KEA kaj por UEA en Kanado.

En la posttagmezo kaj vespero okazis prezentoj de Ben Speakman pri la tradukado de videoludoj; de Ardeo Mann pri ŝia studoprogramo ĉe insulo Saturna; de Arlyn Kerr kaj Les Kerr pri vojaĝo tra 'Esperantujo' dum 2015. Fine de la sabata programo Lottie Ericson priparolis fotojn per komentario tre interesa pri sia somera pieda pilgrimado laŭ vojetoj kaj tra kampoj de Portugalio.

Matene de dimanĉo Maksim Petrov montris fotojn de sia vojaĝo al Kazaĥio. Poste, David Jaki parolis pri nova politika iniciato kiun li proponas por kanadaj elektoj. La konferenco finiĝis per tre interesa rakonto de Anne Neave pri la provo de ŝia filo kaj familio grimpi la monton Hugh Neave en la Wells Gray Park. Evidente la monto havas la nomon Neave honore al membro de ŝia familio. Ĝis nun, neniu sukcesis grimpi ĝin ĝis la pinto. La provo malsukcesis, sed alia provo okazos en 2016. Ni deziras al la grimpantoj sukceson, sekurecon kaj bonan sanon en la bela natura medio de Wells Gray Provincial Park!

# Raporto pri NASK
## Don McIntosh
## (stipendiito de KEA)

Pasintan someron mi iris al Raleigh en Nord-Karolino por ĉeesti la Nord-Amerikan Someran Kursaron (NASK). Poste mi aviadis al Slovakujo por lerni pli da Esperanto ĉe Somera Esperanto-Studado (SES). Mi volas danki la Kanadan Esperanto-Asocion, kiu subvenciis mian lernadon per donaco de mono por la kostoj de NASK. La kotizo estis jam pagita kiam la ĉeko alvenis, sed la mono malgrandigis la doloron de pagado de kotizoj por du aferoj.

Mi trovis ke ambaŭ aferoj provizis min per bonegaj lernosesioj. Tamen, estis pluraj diferencoj. Cent naŭdek personoj el 27 landoj partoprenis SES-n. Aliflanke, NASK havis loĝantaron de nur 57 homoj. Tamen, la nombro kreskas jaron post jaro. La plejparto de la partoprenantoj ĉe NASK

venis de Usono kaj estis tri el kanado, mi pensas.

La loĝejo ĉe NASK estis tre bela. La loko estis ĉe universitato William Peace kaj ĝi estis tre bela kampuso kun vicoj de arboj apud la piedvojoj kaj brikaj konstruaĵoj kun



blankaj kolonoj. Ankaŭ la mangaĵoj ĉe NASK estis mirindaj. Sed la loĝejo ĉe SES estis malbone prizorgita loĝkonstruaĵo lasita de sovetia epoko. Eble mi ŝatis la manĝaĵojn ĉe SES malpli ol ĉe NASK ĉar ili estis malpli konataj, sed mi aŭdis aliajn personojn kiuj plendis. Tamen, SES proponis distraĵojn vespere. Muzikistoj venis por amuzi nin. Kaj SES ankaŭ havis ekskursojn al kasteloj. Plia avantaĝo de SES estis ke pro la pli granda nombro da partoprenantoj, SES havis pli da instruaj niveloj. Eble oni povus elekti pli taŭgan nivelon ĉe SES.

Pro mia sperto, mi pensas ke oni ne atendu, ke unu kursaro estiumiraklo, aŭ eĉ kursaroj. Mi ne revenis kiel Esperanta fakulo, sed mi daŭras pliboniĝi kaj kursoj estas parto de tio. Kaj ankaŭ mi ne ĉiam ĝuis la ĉeeston ĉe NASK aŭ SES ĉar partopreni lingva mergo ĉiutage ne ĉiam estas facila. Sed me farus tion denove. Paroladi en Esperanto fariĝas pli facila semajnon post semajno, kaj iam estonte mi povos paroli sufiĉe bone por ke Esperanto-renkontiĝoj estos festoj !

## Raporto pri vojaĝoj en somero 2015 per stipendio de KEA

**Kamila Koziej-Lévêque**

Por memorigi vin, mi estas Kamila, 21 jaraĝa ino el Saguenay, Kebekio, kaj mi promesis rakonti al vi mian unuan sperton de la UK kaj de la IJK de tiu-ĉi somero ! Nu, mi rakontos al vi miajn personajn impresojn — kion mi vidis kaj kiel mi vivis mian ''enkondukon al Esperantujo''.

### 100a Universala Kongreso de Esperanto, Lillo, Francio, 25 julio – 1 aŭgusto

Sabaton matene, en la granda konstruaĵo de Lille Grand Palais, ĉiuj freneze salutis kaj retrovis unu la aliajn el diversaj landoj, tiel kortuŝa familia etoso. Finfine, pli ol 2500 partoprenantoj ĉeestis la kongreson, kaj oni povis vidi ke multaj personoj aliĝis surloke, laŭ iliaj manskribitaj nomŝildoj. Laŭ la kutimo dum UKoj, oni ricevis multe da dokumentoj pri la urbo kaj precipe la gravegan kongresan libron, kiu klarigas la programon kaj aliajn aferojn. Krome, la unuafojaj kongresanoj estis invititaj ĉeesti prezenton pri la ĝenerala funkcio de la UK kaj kiel ĝui maksimume la semajnon. Do, gardante tiun celon en la kapo, kaj volante plonĝi en la esperantan kulturon, mi multe ĉeestis diversajn prelegojn kaj agadojn de la programo kaj mi persone analizis ĝia kompono.



Unue, estis evidente renkontiĝoj de oficialaj esperantaj organizoj, strukturitaj kaj formalaj, precipe pri Esperantujo kaj pri la universala lingvo. Tamen, mi miris vidi diversajn profesiajn organizojn en Esperanto, kiel ekzemple matematikistoj

aŭ ĵurnalistoj, kiuj profitis de la UK por organizi sian ĉiujaran renkontiĝon, kaj kiuj envolviĝas en la socio por ŝanĝoj, aŭ por dividi siajn profesiajn scipovojn en Esperanto. Ankaŭ estis aliaj organizoj aŭ individuoj malpli formalaj, kiuj prelegis kaj dividis diversajn ŝatokupojn kaj scipovojn.



Dancemuloj en la halo de la kongresejo

Fakte, divido de konoj estas granda parto de la programo kaj multaj programeroj estis dediĉataj al ĝi, kiel la tuttagaj ''Internacia kongresa universitato'' kaj ''Kleriga lundo''. Ankaŭ estis diversaj diskutrondoj por interŝanĝi opiniojn kaj spertojn pri iu ajn temo. Evidente, esperantaj kursoj por komencantoj kaj progresantoj estis proponitaj, aŭ ankaŭ enkonduko al francaj lingvo kaj kulturo. Finfine, la kultura programo estis tre riĉa : tre interesa libroservo, bonega teatro, diversaj danc-kursoj, kant-atelieroj, mojosaj koncertoj kaj spektakloj, eventoj ene kaj ekstere de la kongresejo, kaj la nacia kaj internacia arta vesperoj.

Sed por multe da programeroj, ekz. miaj progresantaj kursoj, kiujn mi ĉiam maltrafis, oni vere devis rapidiĝi ĉar ofte, la lokoj estis plenplenaj kaj oni ne povis eniri! Same por la tuttagaj ekskursoj merkrede, kiam homoj iris interalie memori la unuan Internacian kongreson de Esperanto. Tamen mi ne mendis ekskursojn nek en UK nek poste, en IJK. Anstataŭe, mi partoprenis kun aliaj gejunuloj ekskurson en parkon, kiu estis organizita surloke. Fakte, rande de la oficiala programo estis iu amuza sistemo de afiŝoj kaj de agadoj organizitaj

per buŝ-al-oreloj, per kiuj gejunuloj organizis apartajn vesperojn, dum aliaj partoprenantoj reklamis siajn proprajn agadojn aldonitajn al la programo. Do, post tiu ĉi UK, mi konkludis ke fakte, ĉiuj kreas sian personan universalan Kongreson kaj amuziĝas, riĉiĝas kaj interŝanĝas laŭ sia propra volo.

## 71a Internacia Junulara Kongreso, Wiesbadeno, 2 – 9 aŭgusto

Havanta nur la tempon por trapasi la landojn, mi alvenis al IJK dimanĉon vespere kaj mi tuj rimarkis la tre junan, malformalan kaj malstreĉiĝan etoson, kiam ĉiuj jam havis bieron en la mano. Fakte, la kongresejo koncentriĝis en unu loko: ĝi estis kiel granda simpatia esperanta vilaĝo, kiu enhavas ĉambrojn kaj tendlokojn, manĝejon, prelegajn kaj atelierajn klasejojn, grandan terenon, trinkejon, diskejon, gufujon, libroservon kaj kinejon. Tiun etoson aldonitan al la ripozigaj, varmegaj tagoj, mi vere ĝuis dum la IJK, kaj mi partoprenis malpli da prelegoj ol dum la UK, sed mi renkontis ege mojosajn personojn.




**Partoprenantoj en la 71a IJK**




La konsisto de la programo estis simila al tiu de UK, kaj la temo, pri tutmonda justeco, estis vere interesa kaj aktuala propono. Kiam mi pripensis pri la esperanta movado, kaj eĉ kiam mi vidis Esperantujon, mi havis tiun demandon: ĉu homoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto, esperantistoj, apriore estas personoj kiuj zorgas pri tutmonda justeco, kiuj envolviĝas kaj agas en sia komunumo? Ŝajnas ke jes!

La programo estis plena je agadoj pri novaj, modernaj paradigmoj, konceptoj kaj aranĝoj, kaj ĝenerale, la pripensoj estis tre interesaj, tre kritikaj. Homoj tie havas tiun volon por ĝustigi maljustecojn, eĉ en la movado mem : la junularaj esperantistaj organizoj levis la punkton de la rifuzo de vizoj al esperantistaj junuloj el afrikaj landoj kaj proponis organizi iun venontan IJKn en Afriko, aŭ ankaŭ ekagis por investi en siaj ekzistantaj programoj de esperanta lernado. En la IJK mem estis aranĝoj por veganoj kaj vegetaranoj, kontraŭdiskriminacia teamo kaj tabulo por kritikoj ĉe la fino de la kongreso. Cetere, la programo enhavis multe da prelegoj pri temoj, kiuj ege interesas min, kiel feminismo, GLAT komunumo kaj neduumaj

genroj, kaj mi lernis multe dum tiuj prelegoj!


Krome homoj multe interŝanĝis siajn konojn, ŝatokupojn kaj scipovojn, ofte pli-malpli junaj fenomenoj, ekzemple geokaŝado, ''braceletoj de amikeco'', aŭ eĉ mia propra prelego pri la retmovado ''Homoj de…'' (ekzemple, Humans of New York sur Facebooko). Kompreneble, la kultura programo estis ankaŭ tre riĉa, plena je manartaĵaj, dancaj, kantaj kaj instrumentaj atelieroj aŭ da mojosaj koncertoj.



Ni ankaŭ eliris la kongresejon por prezenti niajn diversajn landojn al la enloĝantoj de Wiesbadeno, kaj korege invitis ilin interesiĝi pri la internacia lingvo. Kaj kompreneble, pro la trinkejo kaj la diskejo, oni povas diri ke esperantistoj estas ege festemaj homoj! Oni multe dancas, kantas, drinkas, babilas esperante, eĉ la ludoj enhavas esperantajn referencojn.

Aliflanke, mi rimarkis ankaŭ afiŝojn pri IJS, la Internacia Junulara Semajno kiu estis organizita tuj post la IJK, kaj dum diversaj interŝanĝoj, mi malkovris ke ekzistas ege diversaj manieroj uzi Esperanton, implikĝi aŭ labori en la movado kaj  vojaĝi nur per esperantaj renkontiĝoj. Do mi miris kaj ĝojis ke homoj ankaŭ renkontiĝas post la UK kaj la IJK, ke ili plene vivas esperante. Nu, post tiu ĉi dua semajno de plonĝo en Esperantujo, mi konkludis ke la esperanta movado estas kiel tute paralela mondo, kompleta, multeflanka kaj ege interesa, tamen kiu certe konektiĝas kun la realeco de nia mondo kaj kiu serĉas solvojn tra paco, interŝanĝo kaj Humanismo. Do, finfine, kiel la kanto de Jonny M, mi volas diri dankon al ĉiuj. Mia esperanta sperto estis simple mojosa. :)

# Granbio invitas vin




Mekaro estas la **Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto** kaj 2016 estas ĝia 12a datreveno. Mekaro estas turisma semajnfino, kiu okazas ĉiujare, alterne en Kebekio kaj en Ontario, dum la longa semajnfino en majo. Tiu semajnfino estas la Tago Nacia de la Patriotoj en Kebekio kaj de la Viktoria Tago en Ontario. Ĝin organizas la Esperanto-Societo Kebekia kaj lokaj Esperanto-kluboj en Kebekio kaj Ontario.

La venonta Mekaro okazos en Granbio, Kebekio, de la 21a ĝis la 23a de majo 2016.

Aliĝilojn vi trovas je la retejo de MeKaRo:

http://www.mekaro.ca/Bonvenon.html

# NOREK (NordOkcidenta Regiona Esperanto-Konferenco)

DATO: 16-18 Septembro 2016 (Vendreda vespero ĝis dimanĉa tagmezo)

PROGRAMO:
Vendredon (vespere): Interkona Vespero, 6h00ptm ĝis 9h00ptm ĉe la hotelo, manĝetoj kaj ludoj ĉe la hotelo
Sabaton (matene kaj posttagmeze): Pramvojaĝo al Friday Harbor, tagmanĝo ĉe restoracio tie, ludoj kaj distraĵoj en la boato.
Sabaton (vespere): Picoj kaj paroladoj ĉe la hotelo
Dimanĉon (matene): Ĉiĉeronado tra Anacortes, inkluzive de Parko Cap Sante

Se vi volus mallonge prelegeti aŭ prezenti ion, gvidi ludojn aŭ distraĵojn, ktp, bonvolu skribi al la organizantoj ĉe norek2016@morsekob.org .

HOTELO:
Anaco Bay Inn
916 33rd Street, Anacortes
1-877-299-3320 (7atm ĝis 10ptm PHZ)
office@anacobay.com

Anaco Bay Inn rezervis 8 "reĝin-litajn" ĉambrojn por ni je la speciala prezo de 100 USD plus imposto por ĉiu nokto. La unuaj 8 homoj, kiuj rezervos, ricevos tiun prezon ĝis la 30-a de junio. Oni devas voki, diri ke vi estas kun la grupo NOREK, konfirmi la ponoktan prezon de 100 dolaroj, kaj doni kreditkartan informon, por konfirmi

rezervon. Prezo inkluzivas leĝeran matenmanĝon, ĉiumatene de la 7-a ĝis la 9-a horo. Oni povas preni la ĉambrojn ekde la 15-a horo kaj redoni la ŝlosilon ĝis la 11-a horo en dimanĉo. Sendrata interreto haveblas. (Ni devas mendi minimume ses ĉambrojn por ricevi senpage la uzon de la konferenca ĉambro en la vesperoj de vendredo kaj sabato.




KOTIZO:
La konferenca kotizo estas 30 USD, pageblaj vespere de vendredo kiam vi alvenas. Tio pagos por la manĝaĵoj tiuvespere, pico sabatvespere, kaj por subvencio al la aŭtoparkaj elspezoj de tiuj, kiuj veturigos nin al la pramŝipo. Vi mem aparte pagas por via hotela ĉambro (vidu supre). Krom tio, vi devos pagi 13,10 USD (6,55 se vi aĝas malpli ol 18 aŭ pli ol 65 jarojn) por la pramŝipo, kaj laŭ la menuo la koston de via lunĉo en Friday Harbor. La hotelo donas senpagan matenmanĝon.

ALIĜO:
La organizantoj tre deziras antaŭscii kiu(j)venos, por pretigi nomŝildojn kaj aĉeti sufiĉajn manĝaĵojn por la vendreda vespero. Bonvolu sendi retmesaĝon kun ĉiuj nomoj al norek2016@morsekob.org. Antaŭdankon!

# Stipendioj de KEA

La estraro de KEA lastatempe decidis denove proponi stipendiojn al anoj de nia asocio por helpi aparte la junajn anojn ĉeesti kongresojn, kursojn k.s.

(1) KEA disponigas ĝis du stipendiojn (ĝis 1000$) por ebligi partoprenon en la ĉi-jara NASK (pri kiu vidu la anoncon je p.35). Kandidatoj bv. sendu sian petleteron al Geoffrey Greatrex, greatrex@uottawa.ca ; decidos pri la aljuĝo de stipendio(j) la anoj de la eduka komisiono de KEA. **Limdato : 15a de aprilo 2016.**

(2) KEA ankaŭ disponigas stipendiojn por tri aranĝoj en 2016. Ĝi disponigas po unu stipendio de 300$ por MeKaRo (majo 2016), NOREK (septembro 2016, vidu p.25) kaj ARE (oktobro 2016). Rajtas peti subvencion kanadaj gejunuloj (ĝis 30 jaraĝaj). Oni sendu petleteron al Geoffrey Greatrex, retadreso supre. La limdatoj varias en ĉi tiu kazo, sed peto atingu lin minimume unu monaton antaŭ la kunveno mem.

## Filmfarado en la fokuso


Kunlabore kun la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) kaj la Kino-Teatro-Festivalo (KTF), AMO 12 sukcese donis unuan, aŭ daŭrigan trejnadon pri kinoarto kaj filmfarado al pli ol kvardek partoprenantoj, inter la 30a de junio kaj 9a de julio. Efektive, tio estas longigo de la planita seminario, pro la entuziasmo de la partoprenantoj, kaj la dilgenta laboro cele al preparo de videofilmeto. Por la ebleco daŭrigi nian laboron kaj lernadon, ni tre dankas al NASK kaj KTF.

Ĉirkaŭ sesdek personoj partoprenis en iuj eroj de la programo pri Aktivula Maturigo (AMO). Kune kun membroj de la loka publiko, ni komencis per prelego de la verkisto, reĝisoro, kaj film-faranto Christopher Mihm (SMG: pluraj el liaj filmoj videblis en lastatempaj UK). Post la eldonado de dek sendependaj, plenlongaj filmoj, kvin kun dialoga trako kaj subtitoloj en Esperanto, Christopher priparolis la defiojn kaj sukcesojn de lia aliro al filmfarado, kaj la avantaĝoj, kiujn li vidas pro la aldono de Esperanto al liaj filmoj. Ĉeestantoj ĉerpis multon el lia granda sperto en la metio. Li finis la vesperon per prezento de sia plej lasta filmo.

La cetero de la semajno dividiĝis inter prelegoj kaj similaj instru-sesioj kaj praktika trejnado pri la teknikaj kaj rakontaj metodoj, kiuj subtenas la kreadon de sukcesa videofilmo. La originalan tekston de nia projekto verkis Tim Westover, konata pro siaj romanoj kaj noveloj. Dum la kreado, ni notis la grandan kongruecon inter fikcia kaj ne-fikcia produkto, kaj la foje gravajn distingojn inter la du kampoj. La prelegoj traktis interalie la sekvajn temojn: antaŭplanado, teknikaj rimedoj kaj bezonoj, fotiloj kaj son-registriloj, verkado de scenaroj, tradukado rilate al filmado, terminologio, kiel atingi la publikon, kaj redaktado/muntado. Riĉardo Delamore el Aŭstralio tre interese prezentis pri la interreta televida kanalo, Esperanto-TV.

http://esperantotv.net

Kerna teamo de 15 homoj daŭre laboris pri la preparo de la filmeto, kun subteno de aliaj partoprenantoj, kiuj ĉeestis unu aŭ pliajn laborsesiojn. AMO-anoj povis sperti kaj spertiĝi en la uzo de la fotiloj/kameraoj, mikrofonoj, sonregistriloj, kaj aliaj aparatoj. Ili lernis ion pri la planado kaj aranĝado de kamera-pozicioj, la elekto de lenso-longoj, elekto de fokuso, kolor-ekvilibro, la traktado de moviĝo de la aktoroj/subjektoj ene de la kadro, kun kaj sen dialogo, longoj de la sceneroj, ŝanĝoj en fotila pozicio de unu scenero al la sekva, mastrumado de natura lumo kaj elektra lumo, reĝisorado, kaj prinotado de ĉiuj okazaĵoj kaj ŝanĝoj. En la studio, ni ekzercis la registradon de sono, por posta kombino kun la filmo. Super ĉio, ni lernis kiom da tempo necesas por plani kaj filmi malmultajn minutojn de fina video.



La redaktado daŭros dum kelkaj semajnoj post la fino de la seminario, kaj malgranda grupo kunlaboros per interreto de iliaj diversaj hejmoj. Post la fina polurado, ĉiuj povos vidi la mallongan rezulton de tiu grandega laboro per la reto.

La lastan vesperon de la seminario, la grupo spektis kelkajn filmetojn de la antaŭaj KTF kaj NASK, kaj diskutis la fortojn kaj malfortojn de ĉiu ero. Oni prezentis plurajn scenojn el la nuna projekto, kaj la grupo petis spekti ilin plurfoje. Fine, ni parolis pri planoj kaj ebloj por estontaj kunlaboroj kaj projektoj. Multaj partoprenantoj esprimis feliĉon pri la sperto kaj lernado, kiujn ili akiris dum la seminario. Oni voĉis entuziasmon pri la venonta jaro, kaj apliko de la novaj scioj al la bezonoj kaj deziroj de la partoprenantoj kaj de la movado.

Teksto de Derek Roff kaj la teamo

# Rex Murphy, "Rememortago," telesendita de la CBC-a *The National*, la 12-an de novembro 2015.

**Traduko de Wally Du Temple**

Poezio kaj memoro estas patrino kaj filino. La grandaĝaj mitologioj diras tion al ni. En tempo antaŭ raportoj, eĉ antaŭ skribarto, poezio estis la maniero per kiu grandaj eventoj, kaj la emocioj, kiujn ili ekscitis, enfiksiĝis en la popola memoro.

Milito kaj poezio ankaŭ estas antikvaj kunuloj. Ĉiu nacio kaj tribo registris siajn batalojn, venkojn kaj perdojn per verso. La ekirpunkto de poezio en la tuta okcidenta mondo estis la *Iliado* de la blinda bardo Homero, la epopeo de la sieĝo kaj la falo de Trojo, milita poemo. Hodiaŭ en la mondo de Fejsbuko, Tvitujo, kaj la impeto de la interreto, la ligiloj restas: poezio, memoro kaj milito. La ceremonioj de la Tago de Rememoro antaŭ ne longe pensigis nin pri tio.



Krom eble nur la simbolo de la ruĝa papavo, *En Flandraj Kampoj* estas la plej konciza kaj brulanta elvoko de emocioj sentataj de homoj, kiujn ili ŝatus mem esprimi, pri la interplektitaj afliktoj de tiuj, kiuj amis, suferis kaj mortis dum milito. Multaj el ni lernis tiun mallongan, malĝojan kaj

ĝentilan poemon en lernejo. Kaj kiom ajn ofte ni aŭdis ĝin aŭ silente recitis ĝin kiam okazaĵo postulis tion, la poemo neniam tedigas nin. Ĝi retenas la potencon por frapi la koron kaj transdoni respekton kiel nur povas fari la poezio.

La Unua Monda Milito alidirektis poezion de la celebrado de herooj kaj la grandaj faroj de militgrafoj kaj reĝoj — la nocio de triumfo — al la pli larĝa vokvoĉo: la ĝenoj de la marŝantaj soldatoj, la infanterio, la homoj en la tranĉeoj, la pezega, akra suferado de milito. La poemoj de Wilfred Owen — Owen mem mortis nur sep tagojn antaŭ la Tago de Armistico — priskribis ilian rakonton kiel neniu antaŭ li, kun kompato kiel lia temo, kaj ne celebrado.

Rupert Brooke, alia poeto de la Unua Monda Milito — "Se mi mortus, pensu nur jenon pri mi" — kaptis la grandan ondon de perdo, kiu inundis tutan Anglion pro la mortado de junaj soldatoj en iuj fremdaj kampoj.

Afliktoj potencigas patriotismon, kaj poezio fortigas malĝojon. Ni konstatis tion, kiam la vortoj de kanada aviadisto kaj poeto, kiu mortis en la milito kiam nur dudek-unu jaraĝa, estis citita de Prezidento Ronald Reagan dum honorigkondolenco post la tragika eksplodo de la kosmopramo *Challenger.* La fama frazo de *Alta Flugo* de Magee pri ĉielen -glisado for "de la ĉagrenaj ligoj teraj" estis la plej korŝira ero de tiu alparolo.

Kaj kiam ni ĵuras "Pro timo ke ni forgesu," la vortoj de ĉi tiuj poetoj estas tielaj, ke ili helpas al ni honorigi tiun ĵuron. Ĉiun novembron 11-an — tiel multe kiel la ceremonioj, la muziko, la momento de silento — la poezio de la tago kunigas memoron kun emocio. Nu, poezio ne estas preĝado, sed ofte ĝi tiom proksimiĝas al ĝi, ke ni ne povas noti diferencon. *En Flandraj Kampoj* estas mirakla verko tiaspeca — la fluado de rektaj, klaraj vortoj kiuj vagas tiun raran teritorion inter tributo kaj larmoj, kaj, aŭditaj, neniam malaperas de memoro.

# Alta Flugo

Oh! Mi umis ĉielen glise preter akraj teraj ligoj
Kaj dancis ride sur aero per flugiloj brilarĝentaj
Sunen mi soris kun ondumantaj ĝojoj
kaj faris milaferojn sur nuboj sunfenditaj
Preter sonĝoj por vi – pivotis, soris kaj svingis
Alten en sunbrila silento. Ŝvebante tie
Mi postsekvis la kriantan venton, kaj ĵetis
Mian avidan ilon tra etero space ĉie
Alten, alten la brulantan deliran bluon
Mi facilgrace pintis la altecon ventfrapitan
Kie vidis mi nek alaŭdan, nek la aglan flugon
Kie mi portis menson silentzumantan
Al alta la netuŝita sankteco de la spaco
Kaj tuŝetendis manon al Dieca fronto





Traduko de 'En Flandrokampoj' aperos en posta numero. Ĝin prilaboras homoj, kiuj pretigas la Kanadan Antologion.

# Diversaĵoj

Nicolas Viau, Normand Fleury kaj Ĵenja Amis intervjuiĝis dum la UK en Lille de Radio-Canada. Vidu (kaj aŭskultu):

http://ici.radio-canada.ca/emissions/medium_large/2015-2016/archives.asp?date=2015%2F08%2F18



Kastelo Greziljono



Programo de la franca E-kulturdomo en kastelo Grezi-ljono: Vidu daŭran agendon en http://gresillon.org/agendo

2016-aprilo-10/17: PRINTEM-PaS, intensivaj kursoj kaj inter-naciaj KER-ekzamenoj, vidu http://gresillon.org/printempas

# Interesaj retejoj

#Esperantolives:

https://www.youtube.com/playlist?list=PLLg4HNcQo8zwXaBNxzmjPMThavgf4sYi-

Pli pri la someraj vojaĝoj de Kamila:

http://hauteencouleur.com/du-semajnoj-de-plongo-en-esperantujo/

## Kino-Teatro-Festivalo

# NASK kaj Kino-teatro-festo denove kune!

La Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) ankaŭ ĉi-jare kunigas la fortojn kun Kino-Teatro-Festo kaj invitas vin al unu el la plej elstaraj eventoj en Esperantujo! NASK – la plej longdaŭra Esperanto -kursaro en Norda Ameriko –estas unu el la plej gravaj aktivaĵoj subtenataj de ESF. (Esperantic Studies Foundation) Ĝi estas unika kleriga evento, kiu altiras lernantojn de ĉiuj lingvoniveloj kaj elstarajn Esperanto-instruistojn el la tuta mondo.

La kursaro en 2016, jam la trian fojon, estos sur la bela verda kampuso de la universitato William Peace en Raleigh, Nord-Karolino. Same kiel en 2015, Kino-Teatro-Festo (KTF) okazos samtempe kun NASK, tiel ke la partoprenantoj de ambaŭ eventoj povu partopreni en la komunaj aktivaĵoj kaj vidi la finan produkton de la metiejoj de KTF. La plena programo okazos inter la 28-a de junio kaj 7-a de julio kaj la mallonga programo inter la 28-a de junio kaj 3-a de julio. Estos ankaŭ diversaj aliaj aktivecoj: esplorado de muzeoj, butikoj kaj restoracioj de la urbo, ĉio en piedira distanco de la kampuso. Ambaŭ grupoj povos partopreni la feston de la 4-a de julio, kun piroteknikaĵoj!

Ĉiun jaron oni petas al famaj instruistoj kaj movadanoj el la tuta mondo instrui ĉe NASK, kaj ankaŭ en 2016 ni ĝojas anonci la stelan instruistan teamon! La superan kurson gvidos Bertilo Wennergren, membro de la Akademio de Esperanto, la Esperantisto de la Jaro 2006, muzikisto kaj la aŭtoro de la Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko, Detala Gramatiko de Esperanto kaj Landoj kaj lingvoj de la mondo. Tim Morley estos la instruisto de la meznivela kurso. Diplomita instruisto de la angla, Tim, interalie, gvidis esperantigon de OpenOffice kaj instruas la lingvon interrete pere de italki.com (lastatempe, lia priesperantuja adaptaĵo la fifama kartlu-




do Cards Against Humanity furoris en diversaj Esperanto-aranĝoj en Eŭropo). Ĵenja Bondelid ("Helena" el la videokurso Esperanto – Pasporto al la Tuta Mondo) gvidos la komencintan kurson. Fondinto de la Kino-Teatro-Festo, Ĵenja diplomiĝis pri la instruado de Esperanto ĉe la altlernejo Principia; ŝi reĝisoras, danckomponas kaj prezentas sur loka scenejo en Vaŝingtonio. Lee Miller, profesia interpretisto de la Usona Signo-Lingvo, gvidos la postbazan kurson (Lee estas partoprenanto de la kursaro ekde 2000 kaj nun li estas jam delonge unu el ĝiaj gvidantoj). Hoss Firooznia, la redaktoro de Usona Esperantisto, estos helpinstruisto kaj redaktoro de « La NASKa Fasko » kaj gvidos eksterkursajn programojn.

La bazaj kostoj por 8-taga NASK/KTF estas $760 (USD), por 4 tagoj de NASK/KTF $430 se vi aliĝos antaŭ la 15-a de marto (poste la prezo altiĝos je $50).Stipendia helpo haveblas por plentempaj studentoj kaj instruistoj, kaj ankaŭ loĝantoj en latinamerikaj landoj.

Vizitu la retejon

http://nask.esperantic.org

por pli da informoj pri NASK kaj www.kotofesto.org pri KTF. La aliĝilo estas havebla laŭ peto al la administranto de la kurso:

Ellen Eddy, ĉe EDDYELLEN@aol.com.

# Administranto serĉata

Esperantic Studies Foundation (Montrealo) kaj la Novjorka oficejo (por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj) de Universala Esperanto-Asocio serĉas part-tempan aŭ volontulan administranton kapablan prizorgi la financan administradon de ESF kaj la Novjorka oficejo. Kvalifikaĵoj: kapablo pri librotenado (prefere kun sperto pri QuickBooks aŭ preteco ĝin lerni), kapablo skribi Esperanton, akurateco. Preferata, kvankam ne necesa, estus loĝanto de la novjorka aŭ montreala regiono. Tiu persono kunlaborus kun la direktoro de ESF, Joel Amis, kaj la reprezentanto de UEA ĉe UN, Humphrey Tonkin. Temus pri ideala laboro por emerito aŭ suplementa laboro por homo kun alia regula posteno. Salajro dependa de horoj laborataj kaj de kvalifikoj. Skribu al tonkin@hartford.edu.

## DEZIRAS KORESPONDI

Mi estas sinjoro Mana N.Brinso, en Demokratia Respubliko Kongolando. Mi estas lernejestro de nia amata lingvo al georfoj ,kies gepatroj estis mortigitaj dum la milita perido. Mi sukcesis fondi etan lernejon, kie dormas dudeko da orfoj. Mi ankaŭ estas terkultivisto . Mi ne scias, ĉu vi esprimus vian konsenton por ke ni interŝanĝu de tempo al tempo ideojn.

Adreso : mana.esperanto.brinson@gmail.com

# Utilaj retejoj

## La kanada Esperanto-movado en Facebook

Esperantistoj povas mult-maniere uzi la socian reton Facebook por disvastigi informojn pri agado en la kanada Esperanto-movado kaj por informi kanadanojn pri agado en la ekster-kanada movado. Pluraj paĝoj kaj grupoj evoluiĝis tiucele.

(Notu bone: kvankam oni bezonas havi Facebook-konton por sekvi FB-paĝon aŭ por esti membro de FB-grupo, ĉiu uzanto de interreto povas rigardi la FB-paĝojn kaj legi iujn de la afiŝoj sur la paĝoj.)

## Paĝoj

Esperanto en Kanado (https://www.facebook.com/EsperantoKanado/)

La unuaj afiŝoj sur ĉi tiu paĝo, kiu celas esti informejo por la kanada Esperanto-komunumo, datiĝas de 2011, ĝis la 18-a de februaro: 498 ŝatoj. Novaj afiŝoj ne abundis de 2011 ĝis 2014; estis pli da vigleco dum 2015.

Kanada Esperanto-Asocio (https://www.facebook.com/KanadaEsperantoAsocio/)

Ĉi tiu paĝo kreiĝis en marto 2015 unuavice por disvastigi novaĵojn de KEA inter tiuj kiuj interesiĝas pri nia asocio; ĝis la 18-a de februaro: 831 ŝatoj.

Universala Kongreso 2019 en Montrealo (https://www.facebook.com/Montrealo.kongreso/)

Ĉi tiu paĝo kreiĝis en 2014 por dissemi informojn pri la provo inviti la Universalan Kongreson al Montrealo por la jaro 2017; la fokuso ŝanĝiĝis kiam tiu invito malakceptiĝis kaj oni decidis inviti la UK-on por la jaro 2019; ĝis la 18-a de februaro: 1422 ŝatoj.

Esperanto-Societo Kebekia (ESK) (https://www.facebook.com/Esperanto-Societo-Kebekia-ESK-165008536858789/)

Ĉi tiu paĝo kreiĝis en 2010 unuavice por disvastigi novaĵojn de kaj pri la kebekia Esperanto-movado; ĝis la 18-a de februaro: 889 ŝatoj.

Espéranto Saguenay (https://www.facebook.com/Esp%C3%A9ranto-Saguenay-1433956080150833/)

Ĉi tiu paĝo kreiĝis en 2013 por disvastigi novaĵojn de la Esperanto-klubo de Saguenay; ĝis la 18-a de februaro: 634 ŝatoj.

## Grupoj

Esperanto-Canada (https://www.facebook.com/groups/EsperantoCanada/)

Ĉi tiu publika grupo estis kreita en 2008 kiel forumo por la interŝanĝo de informoj kaj ideoj inter kanadaj esperantistoj, kvankam multaj membroj de la grupo estas eksterlandanoj kaj nur malmultaj afiŝoj rilatas Kanadon aŭ la kanadan Esperanto-movadon; je la 18-a de februaro: 283 membroj.

Membroj de Kanada Esperanto-Asocio (https://www.facebook.com/groups/kanada.esperanto.membroj/)

Ĉi tiu fermita grupo (nur por membroj de KEA) estis kreita en 2013 por plifaciligi komunikadon al kaj inter la membroj de Kanada Esperanto-Asocio; je la 18-a de februaro: 42 membroj.

UK en Montrealo – Organizantoj kaj helpantoj (https://www.facebook.com/groups/UK.Montrealo.organizantoj/)

Ĉi tiu fermita grupo estis kreita en 2014 por plifaciligi komunikadon inter tiuj kiuj pretigas la inviton por la Universala Kongreso 2019 en Montrealo kaj (post akcepto de la invito) tiuj kiuj organizos la kongreson; je la 18-a de februaro: 27 membroj.

Esperanto-Toronto (https://www.facebook.com/groups/esperanto.toronto/)

Ĉi tiu publika grupo estis kreita en majo (2015) por plifaciligi komunikadon inter la esperantistoj de Toronto; je la 18-a de februaro: 30 membroj.

*Pretigis la artikolon la prezidanto de KEA, Paŭlo Hopkins. La detaloj pri la retejoj validas je 19a de februaro 2016.*